

La Internacio de Socialista Kunbatalo (ISK) kaj ĝia rilato al vegetarismo kaj Esperanto

resumo de prelego farita 2018-05-11 ĉe la Renkontiĝo Vegana (ReVe) en Greziljono

1. ISK
2. Vegetarismo en ISK: historio laŭ *Das Schlachten beenden!* k.a.
3. ISK, Esperanto kaj SAT
4. fontoj

1. ISK

La **Internationale Sozialistische Kampfbund** (ISK) [laŭvorte: Internacia Socialisma Batalligo] estis socialisma desplitaĵo de la Socialdemokrata Partio SPD dum la epoko de la respubliko de Weimar, kaj estis aktiva en la rezisto kontraŭ la nacisocialismo (naziismo). Internacie ĝi uzis la nomojn **Militant Socialist International** (MSI), **Internationale Militante Socialiste** kaj en Esperanto **Internacio de Socialista Kunbatalo** .

Historio

La ISK estis la politika-organiza platformo de rondo funkcia ekde 1925 ĉirkaŭ la filozofo el Göttingen Leonard Nelson kaj lia kunlaborantino Minna Specht. Antaŭiris ĝin organizaĵo estiĝinta en la medio de la junulara movado de la jarcentŝanĝiĝo kaj fondita de Nelson kaj Specht en 1917 kun la subteno de Albert Einstein, la Internacia Socialisma Junulara Ligo (ISJ). Leonard Nelson – filozofie alkalkulenda al la novkantiismo – volis kiel universitata instruisto jam frue efiki politike trans la limojn de la universitato. Li estis defendanto de etike motivita, kontraŭklerikala, kontraŭmarksisma, sed ankaŭ kontraŭdemokratie orientita socialismo, kiu inkluzivis krome strikte devigajn bestprotektadon kaj vegetarismon. Nelson decidis fondi la ISK, kiam membroj de la ISJ estis eksigitaj en 1922 el la KPD kaj en 1925 ankaŭ el la SPD.

Por sia publika laboro la ISK transprenis de la ISJ la eldonejon “Öffentliches Leben”, en kiu aperis ekde 1926-01-01 la *isk – Mitteilungsblatt des Internationalen Sozialistischen Kampf Bundes*. Ekde januaro 1929 aperis ankaŭ eldono en Esperanto kaj ekde aprilo de la sama jaro kvaronjare en malgranda eldonkvanto en la angla. La gazeto havis kutime 8-paĝan amplekson kaj aperis en eldonkvanto de mezume 5000 ĝis 6000 ekzempleroj. Apud tiuj eldonaĵoj, la eldonejo publikigis la ĉefajn verkojn de Nelson kaj aliajn verkseriojn.

Fronte al la kreskantaj balotsukcesoj de la nazioj en la malfrua fazo de la respubliko de Weimar, la ISK per la fondo de la tagĵurnalo *Der Funke*, gvidita de Willi Eichler, ekaktiviĝis ankaŭ publike. Rimarkinda estas lia en Berlino vaste afiŝita *Urĝa Alvoko* okaze de la parlamenta elekto de julio 1932, en kiu estis alvokita al “kuniĝo de SPD kaj KPD por ĉi tiu balotkampanjo”. Subskribis ĝin i.a. Käthe Kollwitz, la verkistoj Kurt Hiller, Erich Kästner, Heinrich Mann, Ernst Toller kaj Arnold Zweig, ankaŭ la sciencistoj Albert Einstein, Franz Oppenheimer, Emil Gumbel kaj Arthur Kronfeld.

Post la malpermeso fare de la nazioj en 1933, la ISK plu laboris en la rezisto. Tamen, jam en 1931 la ISK ĉesigis sian “edukadon de kadruloj”, junaj plenkreskuloj, por batali kontraŭ la plifortiĝanta faŝismo. Pli bone preparita por laboro en la subtereco (ekzemple per neniigo de ĉiuj skribaj partiaj registraĵoj) kaj pli malleĝere organizita ol la ankaŭ kontraŭleĝigitaj SPD kaj KPD, la ISK povis plu funkciigi sian rezistan laboron (ellandigo de politikaj fuĝantoj, teknika sabotado, disvastigado de flugfolioj i.a.) ĝis 1937/1938, kiam ĉ. 100 ISK-anoj iĝis viktimoj de ondo de arestoj. Ekde 1941 la ISK iĝis denove pli aktiva. Unu fokusa punkto de la kontraŭleĝa laboro de la ISK estis la provo

konstrui kaŝan sindikaton, la *Sendependan Socialisman Sindikaton* (USG), ĉe kio la grupo ricevis subtenon de la Internacia Federacio de Transportlaboristoj. Unu el la plej konataj rezistaj agoj de la ISK fariĝis la sabotado de la inaŭguro de la Regna aŭtovojo en 1935. En la nokto antaŭ la inaŭgura traveturo de Hitler, aktivistoj de la ISK farbis kontraŭnaziajn sloganojn sur ĉiuj pontoj. La nazia propaganda filmo pri la solena inaŭguro devis esti multloke tranĉita por ne videbligi ilin.

En la ekzilo la ISK eldonis la gazetojn *Reinhart-leteroj* kaj *Sozialistische Warte*, kiujn oni kontrabandis en Germanion kaj kiujn aliaj organizaĵoj de la rezisto alte taksis pro ilia afereca kaj nepolemika raportado. Ligitaj kun la ISK estis la organizaĵoj *Socialist Vanguard Group* en Anglio kaj la *Internationale Militante Socialiste* en Francio.

ISK-anoj post 1945

Post la 2-a mondmilito oni ne plu daŭrigis la ISK kiel organizaĵon, kaj ĝi dissolvis sin post sondaj interparoloj inter Willi Eichler kaj la SPD-prezidanto Kurt Schumacher la 10-an de decembro 1945; la plej multaj eksmembroj aliĝis al la SPD.

Relative multaj eks-ISK-anoj aktivis politike post la malfondiĝo, plejparte tra la SPD kaj kelkfoje en altaj pozicioj kiel parlamentanoj, en unu kazo ĉefministro de federacia lando. Nora Platiel (nask. Block) venis al Kaselo en 1949 post rezistagadoj en Francio (kie ŝi kunlaboris en ISK-grupo en Parizo), kaj tie ŝi realiĝis al la SPD kaj laboris kiel kortuma funkciulo. La multjara ISK-prezidanto Willi Eichler reprezentis la SPD inter 1949 kaj 1953 en la federacia parlamento kaj estas konsiderata unu el la ĉefaj aŭtoroj de la Programo de Godesberg. Fritz Eberhard, kiu apartenis al la ISK ĝis 1939, estis deputito de la Parlamenta Konsilio kaj tie gvide partoprenis la enskribon de la rajto rifuzi militservon en la konstitucio.

Kiel postsekvanto-projektoj de la ISK oni povas vidi la gazeton *Geist und Tat – Monatschrift für Recht, Freiheit und Kultur*, eldonitan de Willi Eichler inter 1946 kaj 1971, kaj ĝis la 60-aj jaroj la eldonejo *Europäische Verlagsanstalt*. La iniciato Socialdemokratoj por Bestoj rilatigas sin eksplicite al Willi Eichler kaj lia eseo *Eĉ vegetaranoj* el la jaro 1926.

Strukturo

La ISK neniam celis gajni grandan membraron, sed havi kiel eble plej aktivan kaj agadfortan organizaĵon, kio utilis dum la rezista laboro ekde 1933. Kontraste kun grandaj partioj, estis multnombraj obstakloj, kiuj tendencis malfaciligi la membriĝon en la ISK:

- kunlaboro en ISK/IJB, sindikato kaj la laborista movado ĝenerale estis deviga por membroj; ne eblis pasiva membreco.
- Anstataŭ membrokotizo estis t.n. partia imposto egala al ĉiuj (!) enspezoj de membro super la nivelo de 150 markoj.
- Eĉ la vivmaniero estis devige aranĝenda laŭ altaj idealoj el la sfero de etika socialismo: neniu nikotino, neniu alkoholo, devigaj akurateco kaj ordo; eksiĝo el eklezio estis pro la kontraŭklerikala sinteno de la organizaĵo membreckondiĉo. Ĉar la ISK postulis bestajn rajtojn, vegetareco estis postulata. La plej altaj funkciuloj estis eĉ alvokitaj vivi en celibateco, kvankam oni laŭ unu atesto neniam konsekvence praktikis tion.

La ISK, certe ankaŭ pro la severaj postuloj al membriĝemuloj, neniam havis pli ol 300 membrojn. Inter ili estis multaj judaj, kaj la kvoto de virinoj estis pli alta ol tiutempe kutime en politikaj organizaĵoj. La membroj estis organizitaj en 32 lokaj sekcioj. La ISK tamen havis ankaŭ kelkoble pli da simpatiantoj enplektitaj en la politika laboro (en 1933 inter 600 kaj 1000). 85% de la membroj estis malpli ol 35-jaraj, kiam oni enketis en la jaro 1929.

Prezidantoj de la ISK (ĝis 1925 IJB):

- 1922–1927 Leonard Nelson (mortinta en 1927 pro leŭkemio) kaj Minna Specht
- 1927–1945 Willi Eichler kaj Minna Specht

De 1924 ĝis 1933 la ISK (resp. ĝia antaŭanto IJB) havis Kamparan Edukejon Walkemühle en la heslanda Adelshausen ĉe Melsungen, kaj de 1931 ĝis 1933 aperis la partia tagĵurnalo *Der Funke*, kiun la nazioj poste malpermesis. La aktiveco de la ISK en la Walkemühle estas intertempe bone dokumentita.

Politikaj ideoj

La rilato de la ISK-anoj al la kunfondinto kaj ĉefa ideodonanto Leonard Nelson estas priskribita kiel “personkulto”. Nelson malakceptis la demokratian principon, laŭ kiu decido de plimulto estas traktenda kvazaŭ racia. Sed li metis en ĝian lokon racio-difinitan gvidanto-principon, kiun oni ofte taksas tre problemeca. Nelson pledis por ideo de racia diktaturo, kredante, ke eblas objektive konstati, kio estas decidenda. Scienca etiko estu la bazo de scienca politiko. Ĉar laŭ Nelson eblas eltrovi science, kio estas ĝusta, t.e. laŭ la morala leĝo, tiu, kiu plej bone scias, kiel realigi justecon, devas regi sen limigoj. Tiu ĉi etike motivita socialismo estis imagita kiel regado de la morale kaj intelekte plej bonaj homoj. Ĉiopova ŝtato plenumu la necesajn reformojn.

Nelson kontraŭis la marksisman instruon pri la historia neceso de evoluo de kapitalismo al socialismo kaj komunismo. Li emfazis la homan respondecon kaj alprenon de “morala kompas”. Tian li trovis en la instruoj de Immanuel Kant.

Dekomence la ISK estis strikte kontraŭnaciisma kaj kontraŭmilitarisma. Eichler dumilite esprimis sin kontraŭ la dogmo de nacia suvereneco. La ISK konsekvence praktikis samrajtigon de virinoj.

Neaŭtoritismaj kaj aŭtoritismaj strukturoj povis ekzisti unuj apud la aliaj. La edukejo Walkemühle edukis infanojn kaj plenkreskulojn al kritika pensado laŭ modernaj konceptoj. Dume, la trejnado por funkciuloj estas priskribita kiel aŭtoritisma.

2. Vegetarismo en ISK kaj en la kontraŭfaŝisma rezisto

Kiel priskribite, vegetara vivmaniero estis deviga membrec-kondiĉo en ISK. Per siaj eldonaĵoj ĝi propagandis vegetarismon ankaŭ alekstere. Ĝi organizis grupvizitojn en buĉejoj por konvinki pri la perforteco de la homa rilatmaniero al bestoj. Tian viziton en buĉejo priskribas Willi Eichler, kunprezidanto de ISK post 1927, en sia eseo *Eĉ vegetaranoj?* (1926). Lastatempe tiu eseo estas repopularigata de socialdemokratoj agantaj en la grupo *Sozis für Tiere* (Socialdemokratoj por bestoj). Willi Eichler postmilite ekagadis en la SPD kaj malradikaliĝis politike. Li gvidis la komisionon, kiu ellaboris la socialdemokratitan Programon de Godesberg (akceptitan en 1959), en kiu la ideo de socialismo aperis nur en tre diluita formo, kaj kiun multaj poste taksis kiel vojmarkilon de dekstriĝo en tiu partio. Mi ne povis ekscii, ĉu li restis tutvive vegetarano.

Nelson samopiniis kun Eichler: “Laboristo, kiu volas esti ne nur ‘malhelpito fariĝi kapitalisto’ kaj por kiu la batalo kontraŭ ĉiu ekspluatado estas serioza afero, tiu ne kliniĝas antaŭ la anateminda kutimo ekspluati sendanĝerajn bestojn, tiu ne partoprenas la ĉiutagan milionoblan murdadon.”

La rezista agado de la ISK kontraŭ la nazia regado estis efika, se konsideri la enormajn malfacilaĵojn kaj la malmultecon de la membraro. Oni aplikis ruzajn rimedojn, kaj unu el ili utiligis la vegetarismon – pri kio poste pli.

Komence de la nazia regado la ISK formulis 4 celojn de la rezista agado: informado, propagando, perturboj kontraŭ la nazioj, sekurigi sin mem. Unu rimedo estis kontraŭleĝaj flugfolioj. La nazioj okazigis elektojn de laboristaj reprezentantoj en entreprenoj, allasante nur “konvenajn” kandidatojn. La ISK kampanjis por voĉdono de malfido kontraŭ ĉiuj kandidatoj – ĝis la nazioj rezignis pri tiuj elektoj en 1936 pro la por ili malfavoraj rezultoj. (Nur 50-60% voĉdonis por la oficiala listo.) ISK-anoj kolektis monon en entreprenoj por la batalo en Hispanio.

Ĉe la jam menciita aŭtovojo-inaŭguro oni dumnokte farbis la pontojn per ĥemiaĵoj, kiuj videbliĝas nur, kiam taglumo trafas ilin, kaj malfunkciigis laŭtparolilojn. Du SS-anoj estis poste mortpafitaj pro nesufiĉe atenta gardado. Nevideblan farbon, kiu videbliĝas ĉe taglumo, oni uzis ankaŭ por stampi sloganojn surpavime, uzante valizojn kun speciala mekanismo. Herbokovritan monteton apud la urba fervojo de Berlino oni prilaboris per sterkaĵo verŝita el kanistroj. Aperis kelkajn semajnojn poste videbla slogano “Nieder mit Hitler” [Malvivu Hitler].

Diskutita en ISK estis ankaŭ plano por mortigi Hitler per sinmortiga atenco, sed estis kontraŭopinioj kaj la plano ne progresis.

En la kontraŭnazia agado enkadriĝis aro de vegetaraj restoracioj, kiujn ISK-anoj funkciigis en pluraj urboj kaj utiligis por konspiraj celoj. Ili estis parte malfermitaj jam antaŭ 1933, parte post la ekrego de la nazioj. Pli grandaj tiaj restoracioj fondiĝis en Berlino, Hamburgo, Frankfurto ĉe Majno kaj Bochum. Laŭ unu raporto la hamburga restoracio pretigis 120 tagmanĝojn ĉiutage.

Ofte ilin gvidis virinoj, sed laboris kaj viroj kaj virinoj en ili. La labortago estis longa kaj la salajro malalta. Ili utilis por pluraj celoj: provizi laboron al senlaboruloj, generi profiton, kiun oni uzis por rezista agado, ebligi interkontakton de rezistagantoj en relative nesuspektoveka loko, servi kiel bazlokoj por produktado kaj distribuado de kontraŭleĝaj presaĵoj. Tamen, ili servis ankaŭ por propagi vegetarismon.

Ondo de arestoj en 1937 devigis multajn laborantojn de la restoracioj fuĝi eksterlanden aŭ vivi kaŝe. Du fuĝintoj fondis vegetarajn restoraciojn en Parizo kaj Londono. La restoracio en Parizo fariĝis renkontiĝejo de ekzilaj germanoj kaj estis ankaŭ monfonto. Same estis en Londono. Tie oni subtenis tendencon en la Laborista Partio, sekcion de la Nelson-Ligo, la Socialist Vanguard Group resp. Militant Socialist International.

Jen iom ampleksa citaĵo el dokumento de la Urba Arkivejo de Göttingen, kiu kaptas la etoson de la epoko kaj ankaŭ pentras bildon pri la disvastiĝo de vegetarismo en Germanio tiutempe kaj la politikaj implicaĵoj de ĝi, ekz. la disvastiĝo de la legendo pri la “vegetarano” Hitler:

Apud la lokaloj de la ISK en la urbo oni observis ankaŭ la vegetaran restoracion, kiun la patrino de Fritz kaj Helmut Schmalz funkciigis en Weenderstraße 71/72. Auguste Schmalz estis plej malfrue ekde 1927 membro en la ISK; jam antaŭe ŝi gvidis vegetarajn kuirkursojn en la Walkemühle. Vegetaraj restoracioj estis financa kolono de la organizaĵo, kvankam pli profitodonaj kaj tiucele utilaj estis la restoracioj en la pli grandaj urboj kiel Berlino, Hamburgo (tie laboris ekde 1934 Anna Kothe, kiu longan tempon laboris en la sidejo en Göttingen kiel dommastrumistino), Kolonjo aŭ Frankfurto. La vegetara tagmanĝejo de Auguste Schmalz ekzistis plej malfrue ekde 1931 kaj estis regula renkontiĝejo. Hannah Vogt rememoris: “Mi memoras lokalon en Weender Straße – kiun gvidis la patrino de la sindikatisto Fritz Schmalz – kie ĉiuj tagmanĝis vegetare. Multaj el ili estis regule renkonteblaj tie.” Ekde printempo de 1933 oni observis la lokalon, tamen la polico ne sukcesis pruvi, ke okazas inter la gastoj de la tagmanĝejo Schmalz ŝtatmalamikaj interparoloj.

La enspezeblecoj, kiuj malfermiĝis per tia restoracio, altiris ankaŭ la avidan rigardon de la “sampopolanoj” [nazia esprimo, *Volksgenossen* en la germana: noto de gm]. En letero al la rektoro de la universitato fine de oktobro 1933, iu proponis rimedon kontraŭ urĝa manko ĉe la nutrado de la studentoj. Li diris, ke inter la 4000 studentoj estas almenaŭ 150 vegetaranoj, “kiuj nun deziras vivi laŭ la vivmaniero de nia popola kanceliero”, sed ne povas, ĉar “la sola ĉi tie troviĝanta vegetara tagmanĝejo (...) estas gvidata de la eksa komunisto Schmalz”. Tiu laŭ la skribinto eĉ faras reklamon per elpendaĵo sur la nigra tabulo de la aŭlo, malgraŭ, ke eblas pruvi, “ke tie oni propagande influas la studentojn, agante ĉe tio laŭ tre rafinita maniero”. La verkinto de la letero opiniis sia “plej nobla tasko provizi al la studentoj de la Universitato Göttingen plej malmultekoste altvaloran nutraĵon, konforman kun la nova teorio de nutrado”. Li kompreneble esperis la apogon de la rektoro por sia “valora ideo, reprezentata ankaŭ de Hitler, Rudolf Hess, Göbbels (!) kaj eĉ multaj profesoroj en Göttingen”. La tagmanĝejo de Schmalz konserviĝis malgraŭ ĉi tiuj atakoj almenaŭ ĝis la militkomenco.

3. ISK, Esperanto kaj SAT

La ISK frue klopodis disvastiĝi trans la limojn de Germanio kaj uzis tiucele interalie Esperanton.

Registrita en bibliografioj estas la eldono de trimonata esperantlingva *Organo de Internacio de Socialista Kunbatalo* ekde 1929 (eĉ antaŭ la ekapero de similaĵo en la angla). Ekde aŭtuno de 1933 ĝi aperis en Parizo sub la nomo *La Kritika observanto: revuo politika kaj kultura*. Ĝi aperis almenaŭ ĝis la fino de 1939, se ne pli longe. Hermann Platiel estas indikita kiel redaktoro ekde la translokiĝo al Parizo, sed kredeble plenumis tiun funkcion ankaŭ pli frue.

La ISK eldonis tagĵurnalon *Der Funke* [La Fajrero] dum 14 monatoj, inter 1932-01-01 kaj 1933-02-17. Poste ĝin trafis malpermeso. La eldono okazis sub grandaj oferoj, neeviteble ĉe tiel malgranda organizaĵo. Rimarkinda en ĝi estas la strebado al laboristklasa unuecfronto kontraŭ la minacanta faŝismo kaj la tre kritika raportado pri naciismo ĝenerale. La kompleta ĵurnalkolekto estas nun arkivita enrete. Tie eblas trovi tri bonvoleme verkitajn artikolojn pri SAT kaj ĝia kongreso de 1932 en Ŝtutgarto. Kvankam oni atendus, ke ilia aŭtoro estus Hermann Platiel, la uzitaj aŭtoraj sigloj (“M. H.”, “Rpt.”, “O. W.”) ne kongruas kun tiu supozo.

Kelkaj eltiraĵoj el la artikoloj:

Partipolitika neŭtraleco ĉe la laboristaj esperantistoj (el *Der Funke* 1932-06-05)

En la laborista Esperanto-movado, kies plej grava, tutmonde disvastigita organizaĵo estas SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda), la partipolitikaj disputoj, precipe inter la KP kaj la SP, ne mankis. En Germanio ekzistas jam en multaj urboj apartaj komunistaj kaj socialdemokrataj Esperanto-grupoj. Des pli ĝojinde, ke la prezidanto de SAT, Lanti, kiu ankaŭ eldonas la Esperanto-gazeton *Sennaciulo*, staras tute sur la grundo de la partipolitika neŭtraleco de SAT. En malferma letero *Al multaj SAT-anoj* li alprenas starpunkton kontraŭ la komunistaj provoj ligi SAT al difinita politika programo, per kiu la KP volas sekurigi al si pli bonan fundamenton por sia dominado. La KP volas unue, ke SAT devigu ĉiujn membrojn agnoski la marksismon kiel “la ĝustan bazon, sur kiu la firma unueco de la proletaj esperantistoj povas esti fondita”.

[...]

Tre prave Lanti krome reĵetas la opinion, ke nemarksismaj vidpunktoj kiel tiuj de Nelson, Kropotkin aŭ Gesell restu nediskutataj en la gazeto, ĉar “la granda plimulto de

organizitaj laboristoj agnoskas la marksismon kiel la teorian bazon por sia klasbatalo”. Tio estas cetere eĉ ne ĝusta – ni pensu pri Anglio, Hispanio aŭ Hindio!

[...]

Estas dezirinde, ke la starpunktoj de Lanti plu estu difinaj por SAT kaj ĝia gazeto, por ke la tre dezirinda propagando por Esperanto kiel internacia interkomprenilo ĝuste de la batalanta laboristaro ne estu malhelpata de dogmeca kaj partipolitike mallarĝa kadro.

Ni salutas la esperantistojn en Stuttgart [titolo originale esperantlingva] (el *Der Funke* 1932-08-06)

En la dua semajno de aŭgusto kunvenas en Ŝtutgarto la 12-a kongreso de ... SAT. [...]

SAT pro du kialoj estas aparte vokita labori je la kreo de la socialisma unuecfronto:

Ĝiaj membroj estas ligitaj per la ligilo de komuna lingvo. [...]

SAT krom tio plenumas gravan antaŭkondiĉon por la kunlaboro je la kreo de unuecfronto de la diversaj laboristaj partioj. La direkcio de SAT firme kaj sukcese jam de jaroj rezistas kontraŭ la malrespekto de partipolitika neŭtraleco ene de la Asocio. [...]

La laboristaj esperantistoj en Stuttgart (el *Der Funke* 1932-09-01)

La 12-a kongreso de la monda asocio de laboristaj esperantistoj (SAT) estis partoprenita de 250 gekamaradoj el 12 landoj, malgraŭ la malbona ekonomia situacio.

[...]

La plej grava rezulto de la kongreso estis la denova sekurigo de la partipolitika neŭtraleco de SAT.

[...]

Ankaŭ la strebadoj ŝanĝi la nunan strukturon de SAT – kuniĝo de ĉiuj proletaj esperantistoj sen konsidero pri ilia nacieco aŭ raso – per asociigo de landaj asocioj, estis unuanime malakceptitaj.

Escepte de la proponintoj, ĉiuj kamaradoj emfazis la neceson ĝuste nun, fronte al la ankaŭ en la laboristaro kreskanta naciisma ondo, ne nur emfazi la internacian kunligitecon de la proletaro, sed ankaŭ praktike realigi ĝin, por kiu celo la nuna sennacieca organizformo proponas la plej bonan bazon.

[...]

Konata ISK-ano kaj SAT-ano estis Hermann Platiel (1896 [tamen laŭ unu atesto 1886] – 1980). Li estis dungito de la administrego de SAT en Lepsiko de la 8-a de majo 1929 ĝis pentekosto 1932. En Lepsiko li gvidis ankaŭ la lokan filion de ISK. Post la demisio de Lanti el tiu funkcio, li fariĝis prezidanto de la direkcio de SAT de 1933 ĝis 1935. Ĉe SAT aperis en 1935 lia libro *Historio pri la skismo en la laborista Esperanto-movado: dokumentaro kiu montras la kaŭzojn kaj respondecojn kaj preparas la bazon por unueca agado*. Li estis de 1938 ĝis 1939 sekretario de la franca Esperanto-sekcio de ISK. Mi ne scias, ĉu li ekde la 40-aj jaroj plu agadis en SAT aŭ entute en rilato

kun Esperanto. Petro Levi, SAT-aniĝinta baldaŭ post la milito, je mia demando ne memoras esti vidinta lin. Ankaŭ rete mi nenion trovis, sed kompreneble necesus serĉi aliajn fontojn.

En 1943 li kontraŭleĝe fuĝis al Svislando, laboris ĉe “Schweizer Hilfswerk” (Svisa Helpfondaĵo) kaj verkis raportojn por la Londona eksterlanda gvidantaro de ISK. Antaŭ la fuĝo al Svislando li troviĝis en la sudfrancia urbo Montauban, al kiu li fuĝis el la internigejo en Gurs. Tie li geedziĝis kun konata ISK-anino Nora Platiel (nask. Block). En 1949 ili ekloĝis en la germana urbo Kassel, kie Nora komencis karieron kiel kortuma juristo kaj poste deputito de la heslanda parlamento (por la SPD). Hermann laboris kiel direktoro de kasela teatro, laŭ raportoj kun granda engaĝiteco.

Ĉi tiu resumo de faktoj pri la rilatoj de ISK kun Esperanto kaj precipe kun SAT estas tre nekompleta. Pliaj esploroj indus. Esploroj en la arkivo de SAT en Parizo devus liveri ekonojn pri tio, ankaŭ pri Hermann Platiel persone, kaj respondus la demandon, ĉu li kaj eventuale aliaj ISK-anoj rolis en la tiama Vegetara Sekcio de SAT, kion ni povas konjekti, sed nun ne scias.

4. fontoj

- *Das Schlachten beenden!*, Verlag Graswurzelrevolution, Nettersheim 2010 [GWR estas monata ĵurnalo kaj eldonejo dediĉitaj al senperforta anarkiismo, kun ekologia emfazo kaj simpatianta kun veganismo; pli ĉe www.graswurzel.net]
- Heiner Lindner: *Um etwas zu erreichen, muss man sich etwas vornehmen, von dem man glaubt, dass es unmöglich sei – Der Internationale Sozialistische Kampf-Bund (ISK) und seine Publikationen*, Friedrich-Ebert-Stiftung 2006, <http://library.fes.de/pdf-files/historiker/03535.pdf>
- Vikipedio germanlingva: ISK, Nora Platiel kaj esperantlingva pri Hermann Platiel
- urba arkivejo de Göttingen: http://www.stadtarchiv.goettingen.de/widerstand/texte/isk-goettingen_1933-1935.html

Gary Mickle